

**LA PSALMO  
DE  
ĜUSTA KREDO**

*SYOOSINGE* 正信偈

tradukita de Kôno Zyôe

Japana Budhana Ligo Esperantista

1935

## Antaŭ la Esperanta Traduko

“La Psalmo de Gusta Kredo” estas Budhana psalmo, uzata de la anoj de la sekto “Sinsyŭ” (Vera Eklezio aŭ Purlanda Sekto proprasence dirita). Ĝi estas verkita de la sanktulo Sinran, fondinto de la sekto, por resume doni doktrinon de la sekto, kaj ĝian historion ekde Nagarĝuna (Ryŭzyu), unua persono de la mahajana movado en Hindujo ĝis la sanktulo Genkŭ, instruinto de la aŭtoro.

La originala ĉinlingva versaĵo konsistas el 120 sepsilabaj linioj (840 ideografoj). La unuaj du linioj estas laŭdo aŭ preĝvortoj al la Tathagato Amitajo aŭ Amitabo. Ambaŭ linioj estas samsignifaj kun la preĝvorto “Namu-amida-butu”. La sekvantaj 42 linioj (3-44) estas priskribo de la virto kaj povo de la Savanto. La linioj 45-116 pridiras la meritojn de la tiel nomataj Sep Sanktuloj de la Purlanda Sekto; kaj en la lastaj kvar linioj, la aŭtoro rekomendas la elektitan doktrinon, instruitan de la eminentaj sanktuloj. Efektive la psalmo estas densigita esenco de ĉiuj kanonaj skribaĵoj de la sekto Sinsyŭ.

Ĉiun linion oni Esperantigis laueble fidele al la originalo per prozo. Iujn vortojn oni klarigis iomete en la noto; pli bona, pli kontentiga eksplikado bezonus ja grandampleksan komentarion.

Tradukinto.

## La Sanktulo Sinran

La Sanktulo Sinran, fondinto de la sekto Sinsyû, naskiĝis la 21an de Majo, 1173, en la vilaĝo Hino, apud Kioto. Lia patro estis Hudiwara-no-Arinori, unu el imperiestraj korteganoj. Kiam li estis kvar jara, la patro mortis, kaj post kvar jaroj la patrino mortis. Sento de nekonstanteco de la homa vivo dolore tuŝis lian infanan koron, kaj li serĉis rifuĝejon en religio. En la aĝo de naŭ jaroj, li fariĝis disĉiplo de Zitin-Kwasyô, ĉefmonaĥo de la Tendai-sekto. Depost tiam, dum dudek jaroj, li estis en la monaĥejo en la monto Hieizan, kaj studadis budhismajn doktrinojn plej entuziasme. En la aĝo de dudek naŭ jaroj, lia animo ekvekiĝis en la fido al la Budho Amitabo, kaj fariĝis disĉiplo de la Sanktulo Hônen, fondinto de Zyôdo-sekto. Samtempe neante la antikvan tradicion en la budhisma eklezio, li toleris al predikantoj, inkluzive de li mem, edziĝan vivon, kaj forigon de abstinencado pri viando. Post kelkaj jaroj, kiam li estis tridek kvin jara, okazis persekutado kontraŭ la nova sekto, kaj li estis kondamnita al ekzilo. Oni forpelis lin en la provincon Etigo. Post kvin jaroj, tamen, li estis liberigata, kaj tiam rondvojaĝante tra la nordorienta regiono, li predikadis la evangelion de Amitabo. En la jaro, kiam li estis kvindek du jara, restante en la malgranda monaĥejo de Inada, en la provinco Hitati, li verkis la kanonan skribaĵon, "Kyô-gyô-sin-syô", sinteze traktante la doktrinon de Sinsyû, kaj metis al la sekto nove fondita de li la firman fundamenton. "La Psalmo de Ĝusta Kredo" estas versa resumaĵo de la doktrino, kaj ĝi formas parton de la sama skribaĵo. Poste, li denove travojaĝis la landon, kaj ricevis multajn disĉiplojn kaj adeptojn de la sekto. Je la 16a de januaro, 1263, li mortis en Kioto.

Nuntempe la sekto Sinsyû havas 10 ekleziojn, el kiuj, Hongwanzi la Orienta kaj la Okcidenta estas la plej grandaj, kaj ĉirkaŭ 20 milionojn da kredantoj. Ĝi estas la plej influa budhisma sekto en Japanujo.

# LA PSALMO DE ĜUSTA KREDO

## *La Budho Amitabo*

Rifuĝejon mi havas en la Tathagato de Senlima Vivo!  
Plenfidon mi metas sur la Budhon de Mirinda Lumo!  
La Bodhisatvo Dharmakaro<sup>1</sup>, ankoraŭ ne atinginte la Budhecon,  
Estinte sub la gvidado de la Tathagato Lokeŝvararaĝo,  
Observadis la kaŭzon de purlandoj de ĉiuj Budhoj,  
Ekzamenis gradon da boneco de la landoj kaj homoj<sup>2</sup>,  
Starigis la plej altan ĉiosuperantan celadon,  
Kaj faris eksterordinare grandiozan ĵuron de universala savado,  
Kiun Li pripensadis kaj favoris en la daŭro de kvin kalpoj<sup>3</sup>;  
Kaj ankoraŭfoje Li ĵuris ke Lia sankta nomo disaŭdiĝu en ĉiujn direktojn.  
Ĉien radias Lia lumo, senmezura, senlima,  
Senbara, senkompara, ja la lumo suverena!  
Lumo de pureco, de ĝojo, de saĝo,  
Lumo neŝangebla, nepripensebla, neesprimebla,  
Pli hele ol la lumo de suno aŭ de luno lumigas  
    ĉiujn mondojn, multenombrajn kvazaŭ polvoj,  
Por ke ĉiuj vivantoj estu lumigataj de la lumo.  
Lia sankta Nomo, revelaciita de la fundamenta celado, estas la povo de savado,  
Lia celado, al kiu ni sincere fidu, faras la kaŭzon,  
Per tio ni ricevas la perfektan enlumiĝon, atingas Nirvanon,  
Kaj plenumiĝas Lia celado nepre konduki nin en la kompletan restadon.

---

<sup>1</sup> Antaŭ ol fariĝi Budho, la Tathagato Amitabo estis nomata Dharmakaro (laŭ la Sutro Sukhavativjuho - Muryôzyu-kyô).

<sup>2</sup> Pli precize tradukiĝas "homoj kaj dioj"; sed tiel nomata "dio" (sanskrite deva; ĉine 天) estas nur iomete pli supera ol homo estaĵo.

<sup>3</sup> Tre granda unuo de tempo.

## *La Budho Ŝakjamunio*

Por kio la Tathagato Sakjamunio aperis en la mondo,  
Tio estas nur prediki la marvastan favoron de Amitabo.  
Ni, maro da vivantaro en la malfavora epoko, regata de la kvin malpuraĵoj,  
Devas nur kredi kion instruas la Tathagato laŭvere.  
Kiam leviĝas en ni, per senmiksa pensado, sento de ĝojo kaj amo,  
Ne necesas estingi malbonajn pasiojn, sed ni povas atingi la Nirvanon.  
Ordinaruloj, sanktuloj, eĉ perfidintoj kaj mallaŭdintoj, sendiference ĝuos saviĝon,  
Kvazaŭ akvoj el ĉiuj riveroj eniros en la maron, kaj fariĝos samgustaj.  
La spirita lumo de la Savanto ĉiam nin protektadas,  
Kaj jam estas fordetruiĝinta la malhelo de nescio,  
Tamen ankoraŭ avidemo, amemo, koleremo kaj malamemo, kvazaŭ nuboj,  
Vualas la ĉielon super la vera kredanta koro.  
Tio similas al la sunradio, kovrata de nuboj,  
Sub kiuj helas, ekzistas neniu malhelo.  
Kiam ni ricevas la kredantan koron, kaj kun granda ĝojo adorkliniĝas antaŭ Li.  
Tiam baldaŭ ni estos liberigitaj el la malbenitaj Kvin Vojoj<sup>4</sup>.  
Se iu ajn ordinarulo, ĉu bona ĉu malbona,  
Nur priaŭdas kaj kredas la universalan savadon de Amitabo,  
Lin laŭdas la Budho (Ŝakjamunio) kiel superantan komprenemulon,  
Kaj nomas lin "blanka lotus-floro" el la homoj.  
Tiu dogmo, kiu instruas ke ni saviĝas, pro la fundamenta celado de Amitabo,  
per alvokado al Lia Nomo,  
Al malhumilaj, malbonaj vivantoj kun malĝusta opinio,  
Estas malfacilege kredebla, malfacilege praktikebla,  
Tiel ke neniu malfacilaĵo estas plimalfacila.

---

<sup>4</sup> t.e. Infero, malsatega demono, besto, homo, dio.

## *La sep sanktuloj*

Abidharmistoj<sup>5</sup> en Hindujo, la malproksima okcidento,  
Kaj eminentaj sanktuloj en Ĉinujo kaj Japanujo,  
Elmontris la veran volon de la sanktegulo (Ŝakjamunio), veninta en ĉi tiun mondon,  
Kaj klarigis ke la doktrino de savado de Amitabo konformas al la homa kapablo.

## *La Bodhisatvo Nagarĝuna<sup>6</sup>*

La Tathagato Ŝakjamunio, iam en la monto Lanka<sup>7</sup>,  
Profetis antaŭ granda aŭskultantaro: En Suda Hindujo  
Aperos Bodhisatvo, nomata Nagarĝuna;  
Fordetruinte ĉiujn opiniojn de entismo kaj neentismo.  
Li propagandos la plej altan Mahajanan doktrinon,  
Kaj atinginte la gradon de "Gojevivanto", fine li renaskiĝos en la Mondo de Feliĉo.  
Nagarĝuna komparis la malfacile praktikeblan vojon (de mempova saviĝo)  
al ĝena surtera irado,  
Kaj fidis al la facile praktikebla vojo (de alipova saviĝo) simila je agrabla sipirado.  
"Kiuj memoras kaj pripensas la fundamentan celadon de Amitabo,  
Tiuj, dank al Lia povo, baldaŭ eniros en la klason de Certigito<sup>8</sup>,  
Kaj devas nur alvoki ĉiam al la Sankta Nomo de la Tathagato,  
Por danki la Grandan Kompatemulon pro savado universala."<sup>9</sup>

## *La Bodhisatvo Vasubandhu<sup>10</sup>*

La Bodhisatvo Vasubandhu verkis traktaton,  
Kaj rekomendis plenfidi al la Tathagato de Senbara Lumo.  
Per la Sutro li elmontris la veran doktrinon,

---

<sup>5</sup> Abhidharma en sanskrito signifas budhisman teologion aŭ traktaton.

<sup>6</sup> Hinda abidharmisto en la tria jarcento; ĉine 龍樹

<sup>7</sup> Monto en la insulo Cejlono.

<sup>8</sup> La homo, kies savateco estas absolute certa, aŭ kiu neniam returneniros en la mondon de sufero; ĉinlingva 必定, kiu estas traduko de la sanskrita vorto "avivartika". La sama vorto estas tradukita ankaŭ per 不退, aŭ transliterita per 阿毘跋致.

<sup>9</sup> Citaĵo el la verko de Nagarĝuna.

<sup>10</sup> 天親 (Ten-zin); hinda bonzo-filozofo en la kvina jarcento.

Kaj klarigis la povon de Lia celado, kiu nin liberigas el la malbenitaj vojoj.  
Por savi ĉiujn vivantojn, per la povo de la Budho, kiun Li turnas al ni,  
Vasubandhu instruis la misteron de korkoncentriĝo.  
“Se homo plenfidis al la Granda Maro da Virto,  
Li nepre aliĝos (en la estanta vivo) al la anaro de sankteguloj;  
(En la estanta vivo,) li iros al la Mondo de Lotusfloroj,  
Kaj baldaŭ ricevos la korpon de la perfekta Dharmo.  
Tiam kun supernatura povo li revenos en la arbaron de homa pasio,  
Kaj tie en la ĝardeno de sufero, li prezentos sian savontecon per diversaj transfiguriĝoj.”<sup>11</sup>

### *Tanluan*<sup>12</sup>

Nia majstro Tanluan, kiun la reĝo de Liang  
Ĉiam riverencis de malproksime kiel bodhisatvon,  
Ricevinte la doktrinon de Purlando, el la tripitakisto Bodhiruĉi,  
Forbruligis ĉiujn librojn de taoisma misteraĵo, kaj sopiris la Landon de Feliĉo<sup>13</sup>.  
Pri l' traktato de Vasubandhu, li verkis komentarion, kaj instruis:  
Sukhavatio estas frukto de la povo de Lia fundamenta celado;  
Iri tien kaj reveni ĉi tien (por savi aliulojn) estas eble nur pro Lia povo,  
Kaj certigiteco por tio nur dependas de nia kredanta koro.  
“Kiam pekomaĵoj homoj ekvekiĝas en kredanta koro,

---

<sup>11</sup> Citaĵo el la verko de Vasubandhu.

<sup>12</sup> 曇鸞 (Donran); ĉina bonzo, vivis 476-542.

<sup>13</sup> Tanluan, fervora lernanto de la budhisma doktrino, deziregis vivadi longatempe, eĉ eviti morton se eble, ĉar alie li ne povos ellegi tuton da budhismaj skribaĵoj, tiom grandampleksaj. Tiucele li iam vizitis certan taoisman ermiton, kiu, oni kredis, scipovas rimedon de longvivado, kaj elpetis de li librojn de taoisma misteraĵo. En la hejmvoyo el la vizito de la ermito, Tanluan hazarde renkontis hindan tripitakiston Bodhiruĉi. Bodhiruĉi forte riproĉis lin, kiam li demandis, ĉu ekzistas en budhismaj sutroj, iu libro, kiu donas longvivan rimedon pli bone ol la taoismo. La hinda tripitakisto diris ke tiel nomata taoisma misteraĵo estas kondamninda superstiĉo, kaj donis al li la sutron de l' Dekses Manieroj de Meditado (aŭ “Amitajur dhjana Sutra”, kies originalo jam perdiĝis, sed kies ĉinlingva traduko 觀無量壽經 ekzistas gis nun kiel unu el “la Tri Sutroj de la Purlanda Sekto”). Li diris ke tiu homo, kiu nur lernas ĉi tiun sutron, povos liberiĝi el ĉiuj suferoj, kaj ricevi eĉ eternan vivon. Tanluan forbruligis ĉiujn librojn donitajn de la ermito, kaj diligente legadis la sutron. Poste li skribis komentarion al la traktato de Vasubandhu. Cetere, tiu estis Bodhiruĉi, kiu tradukis ĉinlingven la traktaton de Vasubandhu.

Tiam ili povas konscii la Nirvanon jam en la mondo de suferado;  
En la estonteco, ili nepre renaskiĝos en la Mondo de Senlima Lumo,  
Kaj kondukos tien ĉiujn vivantojn en la sufero de la mondo.”<sup>14</sup>

### *Taoĉo*<sup>15</sup>

Taoĉo certigis ke estas malfacile sukcesi en la Nobla Vojo,  
Kaj pruvis ke nur la doktrino de Purlando kondukas nin al enlumiĝo.  
Ĉiujn bonajn agojn, per kiuj oni penas sin savi mem-pove, li deklaris senvaloraj;  
Li rekomendis nur alvoki al Lia Sankta Nomo de Perfekta Virto.  
Pri la tri malperfektaĵoj de la kredanto li avertis plej entuziasme<sup>16</sup>,  
Kaj kondukis nin, naskiĝintajn en la malfavoraj malfruaj epokoj,  
al la savado de la kompatemulo,  
“Eĉ homo travivinta la tutan vivon kun malbonaj agoj,  
se nur kredas li en Lia universala savado,  
Renaskiĝos en la Mondo de Beno, kaj ricevos mirindan frukton.”<sup>17</sup>

### *Ŝantao*<sup>18</sup>

Ŝantao, kiu sola plenkomprenis la veran volon de la Budho (Ŝakjamunio),  
Kaj kompatis la Medito- kaj Nemedito-skolanojn<sup>19</sup>, same kiel perfidulojn kaj malbonulojn,  
Instruis ke la (sola) kaŭzo de saviĝo estas la Sankta Nomo de Senlima Lumo,  
Kaj eksplikis la marprofundan saĝon en la fundamenta celado.  
“Kiam la kredanto fidas al Li kun nevenkebla animo,  
Kaj kun tutkora ĝojo respondas al Lia voko,

---

<sup>14</sup> Citaĵo el la verko de Tanluan.

<sup>15</sup> 道綽 (Dô-syaku); ĉina bonzo, vivis 562-645; aŭtoro de l' fame konata libro: Verkaro pri Sukhavatio (安樂集).

<sup>16</sup> Aŭ laŭvorte tradukite: “Pri la tri ne bonaj kredoj kaj la tri bonaj kredoj li instruis plej entuziasme.” Tiel nomata “tri ne bonaj” estas: ne fervora, ne unueca kaj ne daŭra. “Tri bonaj” estas tieskontraŭo.

<sup>17</sup> Citaĵo el la verko de Taoĉo.

<sup>18</sup> 善導 (Zen-dô); ĉina bonzo, vivis 613-681; aŭtoro de la komentario al kwan-muryôzyu-Kyô 觀無量壽經, kaj ceteraj valoraj traktatoj pri la doktrino de Purlando.

<sup>19</sup> t. e. ĉiuj sektanoj, kiuj penadas sin savi mem-pove.

Tiam same kiel Vaidehi<sup>20</sup> li ricevos la tri kapablojn<sup>21</sup>,  
Kaj baldaŭ ĝuos la feliĉon de eterna vivo."<sup>22</sup>

### *Gensin*<sup>23</sup>

Gensin, kiu vaste esploris ĉiujn predikojn (de la Budho Ŝakjamunio),  
Sopiradis nur la Mondon de Beno, kaj rekomendis al ĉiuj.  
Per unueco kaj mikseco de koro, li juĝis fervorecon de kredanto,  
ĉu profunda ĉu malprofunda,  
Kaj instruis pri ekzisto de du formoj de sukhavatio, vera kaj provizora,  
por du kazoj respektive.  
"Ho, pekulo plej malbona! Nur alvoku al la Budho!  
Ankaŭ mi estas inter tiuj, kiujn Li altiras en la Lumon.  
Malgraŭ ke la pekovualitaj okuloj ne povas vidi,  
La lumo de la Kompatemulo radias sur min seninterrompe."<sup>24</sup>

### *Genkû*<sup>25</sup>

Nia majstro Genkû, kiu bone komprenis la instruon de la Budho,  
Sentis kompaton por ĉiuj bonaj-malbonaj homoj.  
Li starigis la veran eklezion en la ekstremorienta lando,  
Kaj propagandis la elektitan doktrinon en la malfavora epoko.  
"Kial oni revenas vagiradi en la mondo de suferado?  
Ĉar la sento de malkredo fortentas lin.  
Per kio eniri tuj en la feliĉo de eterna vivo?"

---

<sup>20</sup> Nomo de reĝedzino de la lando Magadha en Meza Hindujo. En la sutro Kwan-muryôzyu, kiu estas verkita en la formo de dramo, la Budho Sakjamunio instruas al ŝi plej detale pri doktrino de Sukhavatio.

<sup>21</sup> t. e. ĝojo, kompreno kaj fido, kiujn Vaidehi ricevis per la prediko de la Budho.

<sup>22</sup> Citaĵo el la verko de Ŝantao.

<sup>23</sup> 源信. Alinome Wesin 惠信; vivis 942-1017; bonzo-lerninto de Eizan-templo, Kioto; fondinto de Wesin-skolo en la sekto Tendai; aŭtoro de "Oozyô yôsyû" 往生要集 (Verkaro pri la vojo al Sukhavatio).

<sup>24</sup> Citaĵo el la verko de Gensin.

<sup>25</sup> 源空. Alinome Hônen 法然; vivis 1133-1212.

Tio estas la kredanta koro, kiu kondukas nin tien.”<sup>26</sup>

### *Konkludo*

La eminentaj propagandistoj de la Sutro, kaj la fondintoj de la Eklezio,  
Tiamaniere savas senmezuran vivantaron de senlima peko;  
Monaĥoj kaj laikoj de nuna tempo! Ni unuiĝu en koro,  
Kaj nur kredu tion, kion instruas la eminentaj sanktuloj.

---

<sup>26</sup> Citaĵo el la verko de Genkû.